

Fontoj:

Por la turka: *Karayel*: Esperanto-Türkçe Sözlük, (privateldono), Ankara, 1987

Por la angla: *Wells*: The E.U.P. Concise Esperanto and English Dictionary, The English Universities Press Ltd, London, 1969

Por Esperanto: *Semmacieca Asocio Tutmonda*, La nova plena ilustrita vortaro de Esperanto (NPIV), SAT, Parizo, 2002

Por la franca: *Dubois*: Dictionnaire Larousse Français-Anglais Anglais-Français, Pocket Books, Inc., New York, 1954

Por la germana: *Butin & Sommer*: Wörterbuch Esperanto-Deutsch, Limburger Vereinsdruckerei GmbH, Limburg, 1-a eldono (dato ne indikita)

Por la hispana: http://de.wikibooks.org/wiki/Spanisch/_Adjektiv/_Steigerung

Jackson & Rubio: Spanish Made Simple, New York, 1955

Por la rusa: http://de.wikipedia.org/wiki/Russische_Grammatik#Kurzformen_der_Adjektive

Resumo de la relativa facileco de hindeŭropaj adjektivoj por turkaj lernantoj

Por konstati la finan enrangigojn de la unuopaj hindeŭropaj cellingvoj, necesas kalkuli la averaĝojn de la enrangigoj de ĉiuj cellingvoj.

Lingvo	Bazaj formoj	Komparaciaj formoj	Negativaj formoj	Emfazaj formoj	Elativaj formoj	Egalecaj formoj	Sumo
Angla	1	5	4	2	2	1	15
Esperanto	2	1	1	3	1	4	12
Franca	5	4	3	1	5	5	23
Germana	4	3	6	4	4	3	24
Hispana	3	2	5	6	3	2	21
Rusa	6	6	2	5	6	6	31

Enrangigo laŭ la averaĝo:

Lingvo	Angla	Esperanto	Franca	Germana	Hispana	Rusa
Averaĝo	2,5	2,0	3,8	4,0	3,5	5,2

Enrangigo de la adjektivo

- 1 Esperanto
- 2 Angla
- 3 Hispana
- 4 Franca
- 5 Germana
- 6 Rusa

(daŭrigota)

<g.tucker@gmx.de>

Aŭtora adreso kaj priaŭtora informo en SR 3/2009, p.182

Scienca eŝo

Fonto de la scienc-eŝaĵoj: la datoj (en krampoj) estas la cititaj ŝirfolioj de *Brockhaus*-kalendaro "Kion tiel ne diras la leksikono"

Damaĝo de la ozontavolo

Antaŭ ekzakte 150 jaroj, la 1-an de septembro 1859, la brita astronomo *Richard Carrington* (1826-1875) teleskope observis fortegan radiadan erupcion de la suno. Kaj en la sekva nokto la plej forta iam registrita magnet-ŝtormo tempestis ĉirkaŭ la Teron: telegrafiaj lineoj disŝprucis fajrosparkojn kaj kaŭzis incendiojn. Tiam ankoraŭ ne estis mezureblaj la kvantoj da energi-riĉaj partikloj, kiujn la suno disĵetas – precipe protonojn, hidrogen-kernojn, kiuj eklumigas la belegajn polusajn aŭrorojn, sed ankaŭ produktas nitrogen-oksidojn, kiuj detruas la ozonon. Sciencistoj de la Universitato de *Topeka*, Kansaso/Usono elkalkulis, ke post tiu sunerupcio en 1859 en la polusaj regionoj je alteco de 40 km ĉ. 80% de la ozontavolo estis neniigita, kiu regeneris sin nur post tempodaŭro de kvar jaroj. Aparte de tio, ke ni tute ne povas uzi tiuspecan okazantaĵon en nia nuntempa klimatosituacio, iu tia sunerupcio ekstreme skuus nian surteran komunikad-reton kaj eĉ kaŭzus la kraŝan surterenfalon de niaj satelitoj.

(2009-05-31)

Nigraj pneŭmatikoj

La poŝto estas flava (almenaŭ en Germanujo, en aliaj landoj eble ruĝa), la herbejo estas verda, la neĝo estas blanka kaj la aŭtomobilaj pneŭoj estas nigraj – tute klare, ĉu? Ne, tute ne klare. Kaŭĉuko origine ja estas hele beja, havas naturan sablokoloron. Kaj por nigrigi ĝin oni aldonas fulgon en la rezulta substanco. Tio komence estis intencita kaj necesa faro, ĉar fulgo plialtigas la solidecon kaj fortikecon. Sen fulgo la pneŭmatiko foruziĝus – tipe kaŭĉuke – same kiel skrapgumo. La ruzaĵo pri fulga aldono nomiĝas "vulkanizado", eltrovita en 1839 de *Charles Nelson Goodyear*. Sed pasis tre longa tempo, kaj la nunaj pneŭmatikoj estas teĥnike alte evoluigitaj produktoj. Ne plu estas uzata iuspeca fulgo el kamentubo sed normigita industrifulgo kun la tip-numero N 339. Ankaŭ tiu estas intertempe anstataŭigebla, nome per silana silicoacid-kombinaĵo, kiu estas tinkturebla en ĉiujn kolornuancojn. Sed tion neniu volas. Pneŭmatikoj en flava aŭ siringoviola koloroj estas same nevendeblaj kiel en ruĝa, blua aŭ verda koloroj. Oni do, ankaŭ estonte, aldonos fulgon.

(2010-08-26)